

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2019



♦ Bonhumoraj tagoj en Lahtio
komence de junio, p. 4

- ♦ Aŭtuna ekskurso de EAF en septembro, p. 6
- ♦ Rulseĝano preparas sin por UK en Lahti, p. 12

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Vapaasti lainattavissa, lähde mainittava.

Innehållet får fritt användas om källan anges. Reaperigo kun indiko de fonto.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maispanpaja.info

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: Antti Mikkola admiras la skulptaĵon de Olavi Lanu dum la urba orientiĝado de la 4-a trejnseminario en Lahtio. Lia parulo estis Melina Bister. **Foto/Kuva:** *Melina Bister*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoeo73@gmail.com

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ kuhanenarja@gmail.com

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkätu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Juha Metsäkallas, Turku ✉ Juha.Metsakallas@iki.fi

Miamaria Saastamoinen, ☎ 050 32 89 612 ✉ miamaria.saastamoinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA: FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH

(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando



Kvaran fojon ĉefurbo de Esperantujo en Finnlando!

La serion komencis **Helsinki en 1922**. Tiam ni vivis la kvaran jaron de sendependa respubliko, en la mondo kie malpli ol kvar jarojn pli frue finiĝis la unua industri-skala interhoma buĉado nomita Granda milito, el kies cindro elkreskis Eŭropo de naciaj ŝtatoj pli demokrataj ol estis la malnova mondo. Finnlando serĉis sian lokon. Por internacia kunvivado kreskis intereso al komunlingvo, kaj Esperanto ĝuis kaj intereso ĉe homoj kaj prestiĝon ĉe aŭtoritatoj. La dekkvara Universala Kongreso de Esperanto kun 850 partoprenantoj estis en la tiutempa Finnlando escepte granda internacia evento. La juna respubliko bezonis atenton, aprezon kaj agnoskon.

Esperanto kaj esperantistoj renkontis kaj sukcesojn kaj problemojn en la postaj 20-aj kaj 30-aj. Ne ĉiuj ŝtatoj rilatis favore al internaciemaj aspiroj de siaj civitanoj, kaj ekonomiaj eblecoj fariĝis pli striktaj. Tamen esperantistoj ĉiam flegis siajn retojn, interhomajn kontaktojn per la homara lingvo eĉ tra la plej malfacilaj tempoj de la dua industria homdetruado ene de nur dudekses jaroj.

Ne restas plu inter ni veteranoj de la dekkvara UK, sed la 54-a en **Helsinki en 1969** estis al kelkaj el ni daŭre aktivaj la granda kaj grava sperto kondukinta nin en esperantistecon. Juna homo trovanta sin inter centoj da inte-

resaj personoj el dekoj da landoj, kun plena sento de komunika egaleco kun ĉiuj – tia alproprigas al si Esperantujojn, ekedukas sin tie.

La 80-a UK en **Tampere en 1995** okazis en la mondo kaj en Finnlando spertintaj grandaj ŝanĝoj depost la Helsinki-kongreso. Ŝtatoj ŝanĝiĝis, dispeciĝis kaj malaperis. Daŭris en Balkanio milito. Sarajevo, unu el multaj vigrasoj esperantistaj urboj de la splitita Jugoslavio, estis sieĝata de pli ol tri jaroj. Al Tampere sukcesis veni unu Sarajevano, kaŝvoje, la vivon riskante.

Tampere allogis amase, estis ĉ. 2400 kongresanoj. Nun, **nia ĉijara 104-a en Lahti** – en kies organizado partoprenas inter aliaj plura spertuloj el la Tamperea tempo – restas malpli amasa, sed laŭ etoso certe ne malpli agrabla. Estas finna (kaj verŝajne universala) proverbo ”kvante negranda, etose festanta”.

Reta aliĝo al la UK estas fermita, sed ne gravas, se vi ne jam aliĝis aŭ se vi ĝis la lasta momento devas pripensi vian partoprenon: simple venu al Isku Areena en Lahti dum la kongresa semajno inter la 20-a kaj la 26-a (la 27-a jam estas ferma tago, kaj la 24-an oni ekskursas) kaj surloke aliĝu ĉu plene, ĉu eĉ nur unutage. Indas!

Tuomo Grundström

Somera kurso kaj Trejnseminario 5.–9.6.2019



Nina instruas. Ĉe la tablo sidas Sylvia, Helli, Eira-Liisa kaj Aila.



Sylvia dankas Ninan pro la belaj kursesotagoj.



Partoprenantoj de la trejnseminario ricevas informojn kaj klarigojn.

Bonhumoraj tagoj en Lahtio komence de junio

La somera kurso okazis kiel enkonduko al la 4-a kongresa trejnseminario. Denove ni kolektiĝis en la malnova Popolaltlernejo, nuna gastejo *Opiston Kunkku* sur la

randformaĵo meze de la urbo Lahti. La instiga *Nina Pietuchowska* denove venis instrui kaj kune kun *Sylvia Hämäläinen* ŝi gvidis la grupon de dek studentoj. La kursanoj ne nur

lernis ene de la domo, sed konatiĝis ankaŭ kun la bela kaj varma urbo dum tri tagoj. Ili krome lernis kiel funkcias la lokaj busoj.

Vendrede, sabate kaj dimanĉe alvenis la partoprenantoj al la trejnseminario. Entute kolektiĝis en la gastejo Opiston Kunkku 40 esperantistoj, kiuj ĉiuj scivoleme kaj entuziasme informiĝis pri la kongresaj aferoj. Sabate en la programo estis urba orientiĝado, kiam homoj en paroj serĉis respondojn al diversaj demandoj pri la urbo, pri ĝiaj hoteloj, manĝejoj, domoj, placoj, artaĵoj, publika transporto ktp. Ili revenis al la kunvenojo posttagmeze kaj post la manĝo ĉiuj kune respondis diskutante al la demandoj. Dum la seminario oni konatiĝis ankaŭ kun la nuna situacio de la kongresaj ejoj, artaj aranĝoj,

ekskursaj mendoj k.a. La profesiaj ĉiĉeronoj el la regiono de Lahti diskutis kun la esperantlingvaj gvidantoj, kiuj akompanos ilin dum la ekskursoj kaj interpretos iliajn rakontojn. Dum la pasinta jaro la ĉiĉeronoj lernis la plej bazajn aferojn de la internacia lingvo kaj povas nun sekvi la interpretadon.

Ambaŭ aranĝoj havis bonhumoran kaj informplenan etoson. La volontuloj ricevis informojn kaj kuraĝigon por la taskoj, kiuj atendas ilin dum la kongresa semajno! Nun ek al la kongresa semajno fine de julio! Kvankam sonas malfacile de tempo al tempo, certe ĉio aranĝiĝos ĝis la kongreso!

*raportis Tiina Oittinen,
kursorespondulo kaj sekretario de EAF*

Finnlando havas novan registaron kaj prezidas Eŭropan Union

En nia antaŭa numero ni lastminute sciigis pri la nova parlamento de Finnlando kun la supozo, ke ĉar antaŭ ok jaroj estis malfacile formi registaran koalicion, antaŭ kvar jaroj ne, do evidente ripetiĝos la stato de antaŭ ok jaroj. Tio ne okazis, sed enoficiĝis jam 6.6. nova registaro, kun la socialdemokrato *Antti Rinne* kiel ĉefministro, de kvinpartia koalicio kun apogo de 117 parlamentanoj el 200. – Pri la registara programo ni pluku, ke estos kompili-

ta ŝtata programo por antaŭenigo de enlandaj minoritataj lingvoj, aparte sameaj, karela, romaa, kaj gestolingvo. Pli pri la programo kaj ties efektivigo ni poste raportos al niaj eksterlandaj amikoj.

La Ministra konsilio de Eŭropa Unio estas prezidata laŭ duonjaraj periodoj de persono nomita laŭvice de ĉiu membro-ŝtato. Ekde julio ĝis jarfino estas la vico de Finnlando.

-tg

UEA kongresos en Belfasto, Nord-Irlando, en 2021

Por la 106-a Universala Kongreso la Estraro de UEA elektis Irlandon. La UK okazos unufoje en tiu parto de Eŭropo. La gastiga urbo estos Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando. UEA ricevis tre favoran oferton de kongresejo en *Queen's University* (la Reĝina Universita-

to). La 106-a UK estas planata por okazi de la 17-a ĝis 24-a de julio.

Dume, se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 104-a UK, kiu okazos en Lahtio, Finnlando, de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019, bv. aliĝi rekte surloke en la kongresejo.

Aütuna ekskurso de EAF en septembro

Post la Universala Kongreso en Lahtio ni renkontos la sekvan fojon dum Aütuna Ekskurso. Tiun unutagan eventon ni aranĝos la 28-an de septembro 2019 en ĉirkaŭaĵo de la lago *Tuusulanjärvi*. Unu el niaj volontuloj jam afable certigis, ke ni povos viziti en *Villa Kokkonen*, en *Ainola*, la hejma muzeo de *Jean* kaj *Aino Sibelius* kaj en *Halosenniemi*, kie loĝis siatempe la pentristo *Pekka Halonen*. Lunĉon ni havos en konvena restoracio. Per propra

buso ni veturas ekde Turku kaj prenos vin aliajn survoje kaj en *Järvenpää*.

Notu jam nun la daton! La detalajn sciojn pri horaro kaj kotizoj ni sendos retroŝte en aŭgusto kaj respondas tiam ankaŭ al viaj eblaj demandoj. Antaŭ tio bonan, amuzan kaj netro laborplenan kongreson! Post ĝi bonvenon al la ekskurso!

Estraro de EAF

Esperanton maailmankongressin 2019 kunniakomitea, "Honora Komitato"

Esperantistien maailmankongressin (Universala Kongreso), kuten monien vastaavanlaisten, perinteisiin kuuluu pyytää isäntämaan vaikuttajien joukosta arvovaltainen tapahtuman suojelija, "Alta Protektanto". Suomessa pidettyjen neljän maailmankongressin suojelijana on joka kerta ollut tasavaltan presidentti: *K.J.Ståhlberg* vuonna 1922, *Urho Kekkonen* 1969 ja *Martti Ahtisaari* 1995. Esperanton maailmanliitto, Universala Esperanto-Asocio (UEA) myönsi tuona vuonna Ahtisaarelle perustamansa Zamenhof-palkinnon "merkittävästä kansainvälisestä yhteisymmärryksen edistäneestä työstä". – Mainittakoon, että Kekkonen teos Tamminiemi ilmestyi 1989 esperantoksi Osmo Bullerin kääntämänä nimellä *La finna vojo*,

Suomen tie, ja edelleen István Ertlin käännöksenä unkariksi.

Tämän vuoden Lahden 104. maailmankongressin suojelija on presidentti *Sauli Niinistö*.

Perinteisesti kutsutaan myös kongressimaan eri aloilla ansioituneita kansalaisia antamaan nimensä niin sanottuun kunniakomiteaan, Honora Komitato. Mukaan lupautuvat osoittavat siten arvostustaan yhteiskielen aatteelle ja esperantistien pyrkimyksille kansainvälisen yhteisymmärryksen edistämiseksi. Siinä ovat mukana *Tarja Halonen*, *Tiina Sanila-Aikio*, *Kaari Utrio*, *Lilli Paasikivi*, *Tove Skutnabb-Kangas*, *Jacob Söderman*, *Mauri Antero Numminen* ja *Aki Kaurismäki*.

Esperanto-Asocio de Finnlando donacas al ĉiu kongresano en Lahti la finnan epopeon KALEVALA


Menso nia estu ema, cerboj niaj certe celu re-trastudi tradicion, re-ekpreni belan libron, kiun *Lönnrot* forte forĝis, kaj tradukis *Leppäkoski* por konservi konon praan, por pluporti daŭran scion.

Runojn rulis Karelio, vagis versoj tra Finnlando de la bord' de Blanka Maro ĝis Botnio okcidenta, de Baltmaro en la sudo ĝis la norda Laponio; de patrino al filino, de ŝamano al lernanto.

Kreskis klero en la lando. Tiu vartis siajn filojn, kiuj iris skribon lerni por konstrui la nacion: por kolekti kaj konservi vortojn por popol' komunajn, por kulturon kune krei, por pluporti poemtorĉon. Tion faris *Agricola*, poste *Petro*-episkopo, *Danielo Juslenio*, *Porthan*, *Gottlund* kaj *Ganander*. Lönnrot fine kompletigis kolektaĵon kiel tuton.

Kreskis ankaŭ eksterlande klerigantoj multeflanke, kies cerbo certe celis disdividi dian arton inter la popoloj juste, interkomprenigi ĝuste.

La ideo esperanta trafis en Finnland' junulon Johan Edvard Leppäkoski, kiu prenis sur sin taskon peri finnan poezion, la popolan kaj modernan. Versoj el la plumo fluis, vortoj sur paperon svarmis, ritmoj inter frazoj rajdis, melodioj moduliĝis.



Estis kulturag' giganta, Kalevala Esperanta preta jam antaŭmilite, bombardbrule ekstermite en Viborgo. Reverkita pres-aperis en sesdekaj. Tiam vendiĝinta bone, en okdekajj re-eldone; estis la eldon' grandkvanta al la publiko leganta.

		O	E				E
	E			O			E
E	S	P	E	R	A	N	T
		E				O	E
O	E					E	
			O	E	E		
E						E	O
	E				O		E
	O			E	E		

ESPERANTO - SUDOKO



Mahdollisuuksien tori (Bazaro de eblecoj) 2019, Lahti.

Aarre Antaüenin kirjahyllyssä

Antaüenin kirjahyllyissä on lukemattomia lukemattomia kirjoja, mutta on myös luettuja. Käteeni sattui ohut kirjanen Helppotajuinen Oppikirja Schleyer'in maailmankielessä VO-LAPÜK. Se on tullut Antaüenille Turusta professori Yrjö Väisälän jäämistöstä. Huomaa, että tämä kirjanen on ilmestynyt suomeksi jo kaksi vuotta ennen kuin Zamenhof julkaisi oman yhteiskielensä Esperanton. Kannattaa

tutustua Schleyerin ajatuksiin.

Kirjasen on toimittanut J. Weisell (vieren lyijykynällä kirjoitettu nimi Väisälä) Joensuuissa 1889. Johannes Weisell, J. Weisell, oli Yrjö Väisälän isä. Kirjasessa on käytetty fraktuuraa esipuheessa, mutta varsinainen kielioppi on ”normaalialia” tekstiä.

Sylvia Hämäläinen

Esipuhe

Mikä on maailmankielen tarkoitus?

Maailmankielen tarkoitus on, lyhyimminkin sanoen, helpottaa eri kansakuntain keskuusliikettä niin paljon kuin mahdollista on tässä maatoisessa maailmassa.

Nyt kun kulkuneuvot ovat siihen määrään parantuneet, että saman matkan, mihin ennen tarvittiin kuukausia, nykyään voi tehdä muutamissa päivissä – nyt on myös tarve yleisestä, helposti opittavasta kielestä tunkeutunut kymmenin kerroin suuremmalla voimalla, kuin ennen, esiin. Tämä meidän 19:sta vuosisatamme on höyry- ja sähkön aikakausi. Nyt rientää melkein kaikki aineellisessa suhteessa eteenpäin höyry- ja sähkön voimalla. Mutta eräs kohta on näihin saakka ollut, joka tätä edistymistä – ainakin pienempään kansain suhteeseen – on suuressa määrässä hidastuttanut. Ja tämä kohta on juuri ihmisten erikielisyys.

Tätä erikielisyyttä – ja siitä luonnollisesti myöskin johtuvaa erimielisyyttä – on aina koettu siwistyneistä kansoista mahdollisuuden mukaan poistaa. Niinpä oli jo keski-aikana siwistyneellä maailmalla tawallaan yleinen maailmankieli, nimittäin Latinankieli. Mutta kun tämä kieli oli siksi waikeaa oppia, että esim. herrat aatelismiehet, joista useampi paremmin kykeni miekkaansa kuin kynäänsä käyttämään, harwoin sitä wirheettömästi osasivat – kes-

kisäädystä ei puhettakaan –; niin ei ole kummeksimita, jos on koitettu keksiä tekokieltä, joka olisi niin selvää ja helppoa oppia kuin suinkin waan mahdollista. Näissä kokeissa on jo moni mies päättänsä särkenyt, mutta näihin aikoihin saakka turhaan. Jo oli tullut milt'ei uskonkappaleeksi, että tekokieli kuuluisi mahdolltomuksiin joukkoon, kun Johan Martin Schleyer w. 1881 ensi kerran julkaisi keksimänsä tekokielen perusteet, mitkä niin päivän selwään kumosivat edellä mainitun luulon, että jokaisen, joka on wiitsinyt uhrata parin, kolmen päivän työn perehtyäkseen hänen kieleensä, on täytynt – tahtoen tai tahtomattansa – tunnus-taa, että tekokieli ei ainoastaan ole mahdollinen, waan on myös jo todellisesti olemassa. Ja mikä parasta on, on se, että se on niin äärettömän selvää ja helppoa oppia – siinä kun ei ole mitään mieliwaltaisia poikkeuksia säännöstä eikä mitään selittämättömiä omituisuuksia (n. k. idiotismeja), joita kaikissa kansallisissa kielissä on oikein wilisemällä – että sille siinä suhteessa ei mikään kansallinen kieli likimailenkaan woi wertoja wetää. Tätä paissi on sillä myöskin se etuusuuks kansallisten kielten rinnalla, että sitä ei mikään kansa woi kutsua omakseen. Ja tämä ei suinkaan ole wähin maailmankielen hywistä puolista. Sillä, kuten kokemus

jo kyllä selvästi on kerinnyt näyttää, ei mikään elävä kieli voi tulla yleiseksi eikä yhteiseksi kieleksi – ei edes kauppaliikkeessä, sitä vähemmän muussa ihmiskunnan keskuksliikkeessä. Ja tähän onkin aiwan luonnolliset syyt. Se kansa, jonka kieli tulisi yleiseksi – jos tällainen mahdollisuus otaksuttaisiin mahdolliseksi – tulisi vähitellen kaikilta muilta kansoilta tukahduttamaan heidän kansallisuutensa, mutta tätä kaikki kansat synnynnäisellä waistomaisuudella wastustawat.

Lyhyesti: Jos milloinkaan kieli on wälikappale – yksin ja ainoastaan wälikappale, eikä mikään muu, waikka kyllä sangen tarpeellinen – , niin se on juuri tällainen yleinen maailmankieli. Sillä ei ole muita waatimuksia, kuin sen werran, minkä se voi, helpottaa ihmiskunnan keskuksliikettä. Sen woisi werrata esim. telefoonilaitoksen keskuksasemaan jossakin suuressa kaupungissa. Kun esim. joku telefoonilaitoksen osakas haluaa puhutella toista, soittaa hän keskuksasemalle, jossa hänen johdonsa pannaan yhteyteen puhuteltavan johdon kanssa. Samoin on maailmankielenki laita. Jos esim. Suomalaisen tarve waatii kirjoittamaan Kiinaan, Japaniin tai minne muuanne hyvänsä, syntyy hänessä tietysti ajatus oman äidinkielensä muodossa, mutta tämän ajatuksensa hän

kääntää maailman kieleen. Kirjeen vastaanottaja taas heti sen kääntää omaan kieleensä. Täten on maailmankieli ikään kuin toimittanut telefonilaitoksen keskuksaseman wirtkaa: se on saattanut kaksi aiwan erikielistä ihmistä toistensa kanssa kielelliseen yhteyteen.

Tässä ilmestyy nyt Schleyer'in maailmankielen – Volapükkin – kielioppi ensi kerran suomeksi. Että se on sangen monessa kohden wajakainen, sen tiedän minä paremmin kuin kukaan muu; mutta näitä wajakaisuuksia älköön luettako volapükkin nerokkaan keksijän laskuun, waan yksin ja ainoastaan minun.

*Utrassa Tammikuun 2 p:nä 1889
J. Weisell*

En Esperanta Wikipedio troviĝis en la prezento de la urbo *Joensuu* jena mencio: En 19-a jarcento estis volapuk-movado en Joensuu. Finlingva lernolibro pri Volapuko aperis en 1889 en Joensuu, kun titolo: *Kansainvälinen Kauppakieli. Helpotajuinen oppikirja Schleyerin maailmankieleessä VOLAPÜK*: J. Runströmin mukaan toimittanut J. Weisell. Spodal vpa

Sylvia Hämäläinen

Bonvenon al Finna babilejo!

Finna babilejo on suomenkielinen sivusto, joka on tarkoitettu vapaaseen keskusteluun esperantosta tai siihen jotenkin liittyvistä aiheis-

ta. Ohjeita sen käyttöön on osoitteessa <https://finnababilejo.fi/forumoj/forumo/tiedotteita-ja-ohjeita/> tai lyhyemmin tiny.cc/9n817y


Miten kirjoittaa esperanton erikoiset kirjaimet?

Miten kirjoittaa esperanton erikoiset kirjaimet, on yksi usein esitetyistä kysymyksistä eri esperantofoorumeilla. Kaikissa nykylaitteissa, olivatpa nämä sitten tietokoneita, tabletteja tai puhelimia, kirjaimet ovat olemassa. Kyse on vain siitä, miten ne saa kirjoitettua. Tästä(kin)

aiheesta on Finna babilejossa seikkaperäinen artikkeli, jossa ongelman saa pois päiväjärjestyksestä ainakin tietokoneissa. Eli mene sinne ja hae tämän kirjoituksen otsikolla.

Juha Metsäkallas

La LKK informas



Proksimiĝas la Universala Kongreso. Ĝis la mezo de junio, kiam fermiĝis la reta aliĝilo, aliĝis ĉirkaŭ 850 kongresanoj el almenaŭ 56 landoj kaj ni atendas ankoraŭ pliajn; eblas simple veni kaj surloke aliĝi, ne nur por la tuta semajno, ĉar unutaga bileto aĉeteblas. El Finnlando aliĝis 75 personoj, inter ili multaj estas volontuloj kaj helpantoj. Ankaŭ vi povas vin proponi, se vi jam ne faris.

Ĝis nun pli-malpli pretas la ekskursoj, kiujn gvidos aŭ niaj volontulaj esperantistoj memstare aŭ kune kun profesiaj ĉiĉeronoj el la turisma organizo Lahti-Regiono. Ankoraŭ restas lokoj, se vi deziras mendi ekskurson. Vidu en la Dua Bulteno pri la kongreso, kiun vi trovas en la retejo www.uea.org sub "Kongresoj", se ne jam alilĝis kaj ricevis papere.

La kongresejo, la tuta sportcentro Isku Areena kaj prelegsalonoj en apuda *Koulutuskeskus Salpaus* estas rezervita. Nacian (aŭ:

Kongreslandan) vesperon ofertas al ni kaj ankaŭ al la loka publiko la urbo Lahtio en la ligna artverko Sibelius-domo.

Prelegoj kaj similaj programoj estas preparitaj kaj preparataj. Informoj pri ili jam parte aperis en Revuo Esperanto. Artaĵojn al la kongresanoj ofertas diversaj esperantoartistoj el proksimaj kaj foraj landoj. Tiujn vi vidos alveninte kaj ricevinte la Kongresan Libron.

Vendredon, la 19-an de julio, la LKK-anoj renkontos la volontulojn en Isku Areena kaj ni komencos la intensan kongresan tempon. Antaŭ tio ni havas laborplenajn semajnojn.

Ni faru bonetosan kongreson kune!

Bonvenon al la kongresurbo Lahtio, bondeziras amike Landa Kongresa Komitato

Pasis jam 25 jaroj

Estis al mi vera plezuro viziti en Londono antaŭ kvaronjarcento 1994. Tie mi ekhavis ideon telefoni al *Marjorie Boulton*, kiu loĝis en Oksfordo. Subbrake mi portis la biografion de d-ro Zamenhof verkitan de Marjorie Boulton en 1960. Ankoraŭ la verko sekvas min en la fleĝejo kaj estas ripetlegata ofte. La eldonejo estas *Routledge and Kegan Paul*. Diligente plenumita laboro, fortike bindita. Ankoraŭ hodiaŭ la libro aspektas tute nova, kvankam mi plurfoje tralegis ĝin. Modeste la verkistino rakontis al mi pri sia verkista laboro. Ŝia koro vokis por verki kaj ŝi pensis, ke venontaj generacioj povas plenumi pli detalajn kaj perfektajn librojn pri la temo. Klasikulo estas "La vivo de Zamenhof" verkita de *Edmond Privat*. Poste sekvis la vico de *Aleksander Korĵenkov*. La teksto de Boulton fontas rekte el la koro kaj

pro tio kaptas la leganton plene. Ek de junaĝo Ludoviko cerbumis, kiel eviti kverelojn inter urbanoj en Bjalistoko. Tia kverelema situacio inter lokaj homoj multe ĝenis junan Ludovikon. Li emis mem kontribui aktive por plibonigi la situacion, kies ĉefa kaŭzo laŭ li estis lingvaj malfacilaĵoj.

Diversaj tekstoj pri la temo estas vere legindaj. Ili klare montras kiel celkonscie Zamenhof agis kaj atingis sian celon. Ekestis arogantaj reformistoj, sed d-ro Esperanto efike kun trafikaj argumentoj defendis siajn starpunktojn. Naskiĝis novaj generacioj, ekagis freŝaj fortoj kaj la movado kun la lingvo plu evoluas. Indas ekkoni ankaŭ la pasintajn tagojn pere de nia historia literaturo.

*Jorma Ahomäki
movadano ekde la jaro 1959*

Blinduloj kongresos samtempe kun la UK



Okaze de la 100-jara datreveno eta Steleto invitis blindulojn sperti du internaciajn E-kongresojn. La unuan fojon blinduloj renkontiĝis al

propra kongreso en Prago en 1921 kaj sekvan jaron en Helsinki.

Steleto gastigos nun la kvaran fojon. Ni estos sufiĉe granda grupo, 49 partoprenantoj inkluzive de propraj akompanantoj kaj partempaj helpantoj el 12 landoj. Nia loĝejo estas *Kauppahotelli Grand*, tie ni vespermanĝos kaj vesperumos. Niaj kunvenejoj troviĝas en la korto de Grand (*Lahden musiikkiopisto*, tria etaĝo). Se vi havos tempon, vi estas bonvenaj aŭskulti prelegojn kaj ĉeesti nian Internacian Artan Vesperon. Lunde ne estos IKBE-programo por ke IKBE-anoj povu plene profiti Klerigan lundon de UK.

Dimanĉe post la malfermo de IKBE en salono *Kalevi Aho* je 14.00 sekvos du prelegoj:

Ĉe radikoj de defendo de rajtoj, d-ro *Kari Huuskonen*, estro de blindulmuzeo kaj pri Evoluo de sociala asekuro kaj specialservoj parolos s-ro *Matti Ojamo*, estro de *Näkövammaisrekisteri*.

Sekvaj prelegoj okazos en salono *Hämeenmaa*:

- Marde je la 9-a h d-ro *Jukka Jokiniemi* rakontos pri siaj spertoj de industria entreprenisto. Posttagmeze je 14-16 *Raita Pyhälä* prezentos finnan kuirarton kaj *Anita Dagsmarsdotter* legos referaton pri finnaj naciaj kostumoj.
- Ĵaŭde je 9–12 Prezento de japanaj tradiciaj kostumoj kaj uzo de manĝobastonetoj (IKBE-anoj ricevos bastonetojn donace).
- Je la 19-a horo Akcepto (ne materiaj donacoj), festparolo de *Sakari Kauppinen*, Internacia arta vespero.

Ĝis!

Ritva Sabelli
www.steleto.fi en Esperanto

Brakseĝa itinero en Varsovio

Sur la sojlo de la UK en Lahtio 2019 mi invitas vin por brakseĝa vojaĝo al la lulilo de Esperanto – Varsovio. Tre freŝaj aperas en mia memoro spertoj kolektitaj dum 15 vizitoj. Unue ni direktu nin al la koro de Esperantujo en la urboparto Muranovo. La monumento starigita al la memoro de judoj ĉe la Zamenhof-strato estas konvena ekirpunkto. Nune apud ĝi staras La Muzeo de Polaj Judoj *Polin* starigita en 2013. Ĝian planadkonkurson gajnis la finna firmao *Lahdelma-Mahlamäki*. Tiu vidindaĵo altiras ĉiujare amason da turistoj. Relative proksime situas Juda Tombejo

ĉe la strato *Okopowa*. Ripozejo de d-ro Zamenhof kaj liaj familianoj. La tereno formas grandan nekropolon, kiu estu nepre vizinda loko de ĉiu turisto. Iuj tomboj ne plu estas flegataj pro tre simpla kaŭzo, ke ĉiuj parencoj jam mortis. Indas ankoraŭ rekomendi urbocentran placon ĉe la Reĝa Kastelo kun la kolumno de la reĝo Sigismundo. Se iam estos eble, nepre vizitu la naskiĝurbon de Esperanto – Varsovion.

Jorma Ahomäki
adepto de d-ro Zamenhof ekde 1959.

Lingve studi kaj ludi

En Esperanto, kiel ankaŭ en la finna kaj multaj aliaj lingvoj, "a" estas la plej ofta sono. Do ĝi konvenas por kunmeti amuzan aferon al amikoj afiŝantaj adan atenton al aŭtodidakta ampleksigo de siaj vortprovizoj. Kiu scias la signifon

de ĉiu vorto sen konsulti vortarojn, meritas titolon de elstara erudiciulo edifita en Esperantujo, kaj verku sekvan anagramaĵon el e-vortoj. Ĉi tiun ni dankas al

Börje Eriksson.

Antaŭkongresa anagrama afiŝo

Altestimataj amikoj alilandaj!, afrikaj, aziaj, amerikaj, aŭstraliaj, aŭdu atente! Aliĝu, amase alvenu aventure amikumi, agrable agi asemblee, aktive asociajn aspektojn apogante, admiru arkipelagan akvon, abian aerodoron, atletarenojn, akrobatojn, abstraktajn akvarelajn artaĵojn antaŭneviditajn, antikvajn argilajn asprajn amforojn, agrikulturajn aĵojn, aŭtentajn arkitekturajn atelierojn, aneksajn atriojn, asfaltajn altanojn, amfibisaŭnojn, aŭlojn, apartamentojn, avenuojn.

Aŭditorie amuze aŭskultu akademiajn aŭtorajn artikulaciojn, akuzativajn argumentojn, adjektivajn adverbojn, aktualajn atomteoriabocojn, adicie astrologiajn algoritmojn. Alternative aprezitan aŭkcion akلامe asimiliĝu, admonu asistante administradajn aferojn. Aŭ aĉetu avantaĝe ampleksajn allogajn antologiojn, ambiguajn amromanojn, aforismajn anekdotojn, akomoditajn alegoriajn anĝelajn aŭreolojn, ateistajn aŭgurajn atestojn, ambiciajn antropozofiajn analizojn,

anapestajn anatemojn, arkaikajn altruismajn anarkiajn artikolojn.

Antaŭmatene ankaŭ absolute aŭroran atmosferon aperte animen ade aldonu, afrodizian artemizian aromon akompane amoru! Afable almenaŭ akklamante adoru abelojn, anemonojn, acerojn, akaciojn, akileojn, akonitojn, akvilegiojn, alkemilojn, alteojn, amarilidojn, asterojn, azaleojn. Akceptu amante arbaraĵajn aĉajn animalojn: alkojn, afidojn, aglojn, akarojn, amfibiojn, araneojn, akridojn, akcipitrojn, arvikolojn, aprojn.

Aŭtoritatulaj asesoroj avertas artileriajn armilajn antenojn, aŭtoatencojn, atakalarmojn, abruptajn abismojn, aknajn aeroplanagenojn, aeronauĵtikajn abotajn avizojn, avidajn azilpetantojn, avarajn avojn aludante amfetaminon, acerbe acidan alkoholon, alkaloidajn alumetojn, ambrajn aerosolojn, aŭtomatajn aŭtoklavajn akcidentojn, aliajn agresemajn amoralajn aĵojn.

Anticipi antaŭdankon!

Rulseĝano preparas sin por UK en Lahti

Ne eblas al mi fizike partopreni la 104-an UK en Lahti, sed pensflugile oni povas fari sin preta por sekvi ĉion alimaniere. Taŭgajn librojn mi havas, Pola Retradio funkcias kaj mi jam forte sopiras aperon de Kongresa Kuriero, kiu detale priskribas gravajn okazintaĵojn. Es-

perantisto pretas ĝis la lasta pordego sekvi movadajn faktojn, se Pli Alta Mano permesas funkciadon de cerba maŝinaro.

Feliĉe mi havas sufiĉan fontmaterialon en skribita formo. Koran dankon pro tio meritas la pola verkisto kaj ĵurnalisto *Roman*

Dobrzyński. "Zamenhof en Varsovio" estas la plej freŝa libro. Estu la UK kie ajn en la mondo, ni ne forgesu la naskiĝurbon de Esperanto. Post la dua mondmilito Varsovio estis ruinigita, sed oni sukcese rekonstruis ĉion. Kelkaj belaj bildlibroj atestas pri tio. Krome "La Zamenhof-strato" estas peranto de interesaj historiaj detaloj. Jam 1960 mi komencis legi fortostreĉe la biografion de Zamenhof verkitan angle de *Marjorie Boulton*. Tial nun pli facile digestebla estas "Bridge of Words" de *Esther Schor*. Laŭ mi ĝi estas ĝisdatigita enciklopedieto pri Esperanto. Inter memormalsanuloj mi vivas kaj tial estas necese penetri eksteren el la flegeja hejmo almenaŭ pensflugile.

Stalin kaj *Hitler* persekutis esperantistojn,

sed persisteme esperantistoj luktis kaj pluportis la torĉon.

Hodiaŭ ĝi daŭre lumigas la mondon. Fidela kunlaboro estas forto, kiu portas antaŭen. Ne gravas, kie ni estas. Esperanto vivas en niaj koroj. Espereble gesamideanoj multnombro trovas sian vojon al la urbo Lahti, kiu ĉi-jare vokas.

"Unu rozo kreskadis en verda val' kaj bele briletis en sun'. Aliris vagulo kaj vidis ĝin kaj ne povas forgesi." Proksimume tiel tre bele tradukis finnan popolan kanton "Yksi ruusu on kasvanut laaksossa". Per tiuj ĉi vortoj mi salutas ĉiujn partoprenantojn de UK en Lahti 2019

Jorma Ahomäki
veterana movadano dum 60 jaroj

Aventura itinero tra jardekoj 1920–2017

Estis al mi kaj surprizo kaj plezuro rimarki en mia flegeja librobretaro ses biografiajn verkojn pri d-ro L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto. Freŝa entuziasmo tuj vekigis. La klasikaĵo "La vivo de Zamenhof", kies unua eldono aperis jam en 1920 daŭre altiras relegi ĝin fragmente. Ĝia stilo estas tute unika, kvazaŭ en graniton hakita. Tial mi denove kaj denove volonte foliumas ĝin. Facile kiu ajn povas meti ĝin en la poŝon kaj kunpreni la klasikaĵon de *Edmond Privat*.

Varsoviano *Roman Dobrzyński* kreis du rimarkindajn librojn "La Zamenhof-strato" 2003 kaj "Zamenhof en Varsovio" 2017. Kompreneble pola redaktoro kaj verkisto havas tute specialan sintenon kaj tuŝon al la temo. Iel mi hontas mencii, kiomfoje mi jam tralegis la verkojn de *Dobrzyński*. En flegejo tio kunportas al mi sunbrilajn tagojn.

En la jaro 1960 aperis "Zamenhof" de *Mar-*

jorie Boulton en la angla lingvo. Kun varma koro skribita teksto kaptas la atenton de legantoj. Jaroj pasas, sed mia koro neniel malvarmiĝas – feliĉe mi kuraĝas diri. Pro la menciitaj verkoj ĉemane indas vivi eĉ en bona fermita flegejo.

Valoran donacon al mi sendis *Harri Laine*. Tre alte mi taksas la verkon "Leteroj de L.L. Zamenhof", kiu klare atestas pri taŭgeco kaj valoro de Esperanto kiel universala lingvo. Al la grupo mi ankoraŭ nepre devas aldoni ofte en periodaĵoj menciitan "Bridge of Words", ne elĉerpeblan fonton de bazaj faktoj el la plumo de *Esther Schor*, usonanina lingvisto. Vi rimarkas, ke nia komuna lingvo povas krei pozitivajn efikojn ankoraŭ en la velksezona vivofazo.

Jorma Ahomäki
Turku, Hurttivuori

Markku Saastamoinen

1948–2019

Markku loĝis en *Ylöjärvi* kaj membris en Antaŭen. Li esperantistiĝis komence de la 1990-aj jaroj kaj estis unu el la lokaj aranĝantoj de la UK 1995. Poste li estis kelkajn jarojn membro de la estraro de EAF. Markku estis prezidanto de Antaŭen komence de la 2000-aj jaroj dum du jaroj. Li skutis per sia grandrada skutilo ĉ. 15 km al la laborejo en Tampere kaj al la kunveno Nesto de Antaŭen. Li estis granda amiko kaj uzanto de esperanta kaj alia literaturoj. Li uzis Esperanton kun sia filino kiel sekretan lingvon.

Ni esprimas nian kondolencon al la familianoj.

Esperanto-societo Antaŭen



Markku estis prezidanto de la Tampere societo Antaŭen en la komencaj 2000-aj jaroj. Al evento en Tampere la sportemulo ŝatis skuti.
Foto: Veli Hämäläinen

Memore al sinjoro

Fajszí Károly

Károly Fajszí (1911–2004) estis hungara poŝt oficisto, kiu esperantiĝis okaze de la Budapeŝta Universala Kongreso EAF. Post sia emeritiĝo en la 1970-aj jaroj li komencis kolekti Esperantajn librojn, gazetojn, revuojn, insignojn, standardojn k.a. Tiutempe troviĝis ankaŭ Esperantaj pakumoj por alumetoj, ĉokolado, cigaredoj. Li havigis al si ankaŭ la skribotablon de *Kalocsay*. Ĉio tia kaptis lian intereson. Lia triĉambra loĝejo en budapeŝta etaĝdomo konstruita en la fino de la 19-a jarcento ekpleniĝadis de ĉio Esperanta. La libroj kaj aliaj aĵoj engrimpis ĝis la plafonoj. Lia edzino permesis tion, eĉ fariĝis helpanto en la kolektado. Post kelkaj jaroj jam estis bezonataj du pliaj helpantoj por la katalogado. La unua parto de la katalogo, 542 paĝoj, aperis en 1991. Ankaŭ la dua parto estas aperinta, sed la precizan jaron mi ne scias.

En la 1990-aj jaroj la ekonomia situacio en Hungario ŝanĝiĝis kaj ne plu estis facile kolekti esperantaĵojn. S-ro Fajszí petis eksterlandajn esperantistojn kunporti aŭ sendi aldonantojn al lia kolektaĵo, li volis kompletigi, perfektigi. Mi

vizitis la hejmon de gesinjoroj Fajszí, kiam mi bezonis Esperantajn tradukojn el la fabeloj de *H.C. Andersen*. La endoman ŝtuparon kovris araneajoj, sed en ilia loĝejo daŭris diligenta ordiga laboro. S-ro Fajszí afable disponigis siajn librojn al bezonantoj, kiuj rajtis tie sidiĝi kaj eklegi. Nun de tio pasis preskaŭ 30 jaroj. En majo 2019 mi revizitis Budapeŝton kaj volis vidi la Fajszí-kolektaĵon en la Nacia Biblioteko de Fremdlingva Literaturo. Por tio oni devas aranĝi akcepton almenaŭ unu tagon antaŭ la vizito. Nun oni rajtas legi kaj pristudi la aĵojn sur balkono super iama bela dancejo, nun legosalono, sed el tiu kolektaĵo oni ne pruntas. La kolektaĵo enhavas 12.000 librojn, 1.000 binditajn periodaĵojn, centojn da relikvaĵoj, plurmil presajetojn, krome ankaŭ alilingvaj eldonaĵojn pri Esperanto. Mi ĝuis mian viziton sed demandis, kial la nomo de Fajszí ne vidiĝas sur muro aŭ pordo. Mi trovis statuetojn pri Zamenhofo, portreton pri la fama poeto *Kalman Kalocsay* sed ne bildon pri esperantisto Fajszí Károly.



Nacia fremdlingva biblioteko.
Fotis Raita Pyhälä.

Raita Pyhälä

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki
jukka.p.pietilainen@gmail.com (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispuhantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530
onni.kauppinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454
kimmo.hannula@creavit.fi,
www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu
aini.esp@hotmail.com
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere www.esperanto.fi/grupoj/tampere
(Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi)
☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. www.esperanto.fi/grupoj/turku
tiina.oittinen@pp.inet.fi
☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi
☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 ITELFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. <http://www.steleteo.fi/>
☎ (09) 660 651 steleteo@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
fejo@esperanto.fi Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen jäsen).
bovoeo73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2019

Nro	Limdato	Aperas
4/2019	1.9.	en septembro
5/2019	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivu/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarencatu 15 C 65,
00530 Helsinki.



Posti Green

Esperanto-societo Antaŭen informas

- Someraj renkontiĝoj okazos en la kafejo de la ĉefbiblioteko "Metso" en Tampere lunde je la 17–18 (27.5. – 26.8.).
- 16.09. je la 17.00 Septembra vespero en Nesto
- 14.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 11.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 25.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 16.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun antaŭen-anon vi renkontas en Nesto, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17.

Pliajn informojn vi trovas ĉe la retejo: www.esperanto.fi/grupoj/tampere/programo/

Esperanto-klubo de Helsinki

Sabaton 6.7. vizito de la fortikaĵo *Suomenlinna - Sveaborg*. Ni kolektiĝos en la kajo de HSL apud la vendoplaco tiel ke ni povos ekveturi je la 14-a horo.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 1.9.2019 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 1.9.2019 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.